

EKO 2025

Germane Benine

EKO 2025-24. Jun 3. Pezo kun alk. Kosmos: 1210 KB

Beninano venis al Herzberg

Aperis artikolo kun granda foto en la regiona gazeto *Harzkurier* pri la multflanka agado de la Esperanto-Centro Herzberg kaj pri la vizito de Latifou Gbadamassi el Benino.



Forpasis elstara hungara fervojisto

István Gulyás (30.08.1934 – 10.04.2025) naskiĝis en la sudhungara urbo Pécs en 1934. Li studis en Inĝeniera fakultato de la Konstruindustria kaj Trafika Tehnika Universitato en Budapeŝto kaj fariĝis diplomita inĝeniero en 1957. Li plivastigis siajn konojn kaj partoprenis postdiplomajn instruadojn. Tiel li akiris novajn diplomojn, en 1964 pri ekonomio, kaj en 1972 pri hidrologia kaj publikserva provizado. Li iĝis fak-inĝeniero. La aktivan deĵoron li komencis ĉe la Trakprizorga Servo de MÁV. Poste antaŭenirante li agadis en pli altaj postenoj kaj iĝis estro de la Tehnika Ĉefsekcio de la Ĝeneraldirekcio ĉe MÁV, fine direktoro de la Planinstituto de MÁV. Li emeritiĝis en 1992. Plurfoje oni sin turnis al li kaj komisiis lin fari fakspertulajn ekspertizojn. Dank' al siaj riĉaj fakaj konoj ĉi tiujn komisionojn li plenumis sukcese. Nian komunan lingvon li ekkonis en 1958, kaj en 1962 li iĝis IFEF-membro. Li organizis kaj gvidis lingvokursojn en diversaj fervojaj institutoj kaj deĵorlokoj, ekzemple en la Hospitalo de MÁV en Budapeŝto, en la stacidomoj Keleti kaj Nyugati (**SMG**: Orienta, Okcidenta). En 1982 li trapasis la superan ŝtatan lingvo-ekzamenon kompletigitan per la fervoja fako. Li fariĝis UEA-membro en 1973. Li estis elstara figuro de diversaj landaj, fakaj kaj internaciaj Eo-organizaĵoj. Li estis prezidanto de la Centra Fervojista Fakgrupo en Budapeŝto ekde 1974, membro de la Terminara Komisiono de IFEF kaj vicprezidanto de la Fervojista Fakoj de Hungaria Esperanto-Asocio inter 1980 kaj 1985.



Fonto: IFEF-bulteno 2025-3

Jen la nova prezidantino de IFEF

Mgr. Andrea ŠVUBOVÁ naskiĝis en 1976 en Valtice (Ĉeĥoslovakio). Ŝi studis ekonomion en mezlernejo, poste en altlernejo de socia laboro en Ostrava. Post studado en mezlernejo ŝi komencis labori ĉe fervojo, unue kiel sekretariino kaj poste kiel trajndisponisto, kion ŝi faras ĝis nun. Ŝi loĝas en la urbo Hodonín en Ĉeĥio kun la filo Samuel kaj edzo Josef Švub. Ŝi ŝatas motorciklojn, biciklojn kaj ĝui la vivon. Jam ŝia paĉjo estis konata esperantisto-filatelisto – Vladislav Hasala el Strážnice. Vladislav intencis

transdoni sian intereson pri Esperanto al ŝi. Ekde 2019 ŝi estas komitatano de Ĉeĥa Esperanta Asocio – kasistino, aktiva komitatano de ĈeFEA. Ŝi helpis aranĝi IFEF-kongresojn en Liberec kaj Beroun kaj ankaŭ partoprenis multajn aliajn IFEF-kongresojn. Ĉiujare ŝi kunorganizas kongresojn aŭ konferencojn de ĈEA. Ŝi nun laboras en LKK de la 110-a UK kongreso en Brno.



ĈeFEA preparas fakan ekskurson dum tiu UK: la Ĉeĥa Fervojista Esperanto-Asocio preparas fakan ekskurson al la instru-centro de la firmao SignalProjekt s.r.o., kiu organizas kursojn, klerigadon kaj instruadon de fervojistoj kaj dungitoj pri regado kaj prizorgado de fervojaj sekurigaj sistemoj kaj viziton de laborejoj en produkt-fabrika AŽD Výrobní závod Brno, kiu produktas elementojn de sekurigaj aparatoj por fervojo. La ekskurso okazos antaŭtagmeze la 30-an de julio. La nombro de partoprenantoj estas limigita al 20 personoj.

Interesatoj, bonvolu informi min pri via deziro partopreni la ekskurson per la adreso <redaktoro@ifef.net>. Por la listo de partoprenantoj oni bezonas viajn propran kaj familian nomojn, kongresnumeron, retadreson, telefonnumeron kaj naskiĝjaron. Detalajn informojn pri transporto al la ekskurso-loko kaj kondiĉojn pri partopreno vi ricevos rekte al viaj kontaktadreso antaŭ la komenco de la kongreso.

Ladislav KOVÁŘ

Belartaj Konkursoj diskutitaj

La Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA, Miguel Gutiérrez Adúriz, parolas pri tiu UEA-Komisiono en la 83-a Hispana Kongreso de Esperanto, Sorio 2025.
<https://youtu.be/Eym3vj3n10w>

Hungaraj medicinistoj virtuale

Jen la spektebla Intervjuo dum la 5-a Virtuala Kongreso 2024 pri la 55-jariĝo de Budapeŝta Medicina Esperanto Fakgrupo
<https://www.youtube.com/watch?v=zreW8airgtU&t=1640s>

La 27-an de majo en la kunvenejo de la Budapeŝta Eo-klubo gvidata de Anna Besenyei, mi kun aliaj aŭskultis interesan prelegon de s-ro Ken Caviness, Usona inĝeniero-matematikisto, profesoro en baptistaj universitatoj tra la mondo. Li emfazis, ke li preferas ĉiam kaj ĉie lekciadi, instrui en fremdaj (por li) lingvoj, t.e. ne en la angla, kaj tio motivadis lin elekti laborlokojn en baptistaj universitatoj en Ameriko, Eŭropo kaj Afriko. Alparolis la klubanojn ankaŭ lia edzino, same posedanta Esperanton. Akompanis la gastajn geedzojn Éva Juhász, kiu certe konas ilin tre bone. -- La prelegon aŭskultis ĉeeste eble dekopo; ŝajnis al mi, ke rete sekvas la prelegon tridekopo.

Blazio Waña, Hungario

La greka movado nuntempe

Helena Esperanto-Asocio (HeLEA) ekzistas kaj daŭrigas sian agadon, kvankam ĝi ne plu havas oficialan estraron ekde 2010. Tamen, respondecojn neformale plenumas s-ro **Kostas Kyriakos** en Ateno kaj s-ro **Andreas Zervas**, kiu ankaŭ estas observanto de HeLEA (ĉe la Komitato de UEA kaj fondinto de la Tesalonika Esperanto-Klubo) Jen la ĝisdatigitaj informoj:

Retpoŝtadreso: kontakto@esperanto.gr. **Retpaĝo:** www.esperanto.gr

Mallonga resumo pri atingoj (2019–2024):

- **Rekonstruita kaj modernigita oficiala retejo:** esperanto.gr
Kreo de **retpoŝta diskutejo** per Google Groups
Malfermo de **YouTube-kanalo:** [@HelenaEsperantoAsocio](https://www.youtube.com/@HelenaEsperantoAsocio), kun historiaj filmetoj kaj novaĵoj, plejofte kun subtitoloj en Esperanto kaj la greka
- **Greka traduko** de la kurso esperanto12.net fare de Andreas Zervas
Regula organizado de **retaj Esperanto-kursoj** por komencantoj

Planoj por la estonteco:

Eldono de la libro de Kostas Kyriakos *"Foliumante la historion de Esperanto"*
Aktualigo de la **Vikipedio** (grek- kaj Eo-lingve) pri **gravaj grekaj esperantistoj kaj eventoj**
Produktado de **edukaj videoj** por greklingva publiko pri la lingvo Esperanto
Organizado de **komunutilaj agadoj** kun informa karaktero por la greka socio

Vespero de poemoj en Hameln, Germanio

Tio okazis en la 28-a de majo kaj temis pri Virtuala kunveno. Unue ĉiu povas prezenti sian Esperanto-vorton de la tago. Poste vi estas invitita prezenti kaj deklami viajn plej ŝatatajn Esperanto-poemojn. La ligilo al la Zoom-ĉambro de la Esperanto-grupo Hameleno estas:

<https://us04web.zoom.us/j/851458747?pwd=VGNaVnlXK0taaWFvY0tiMmRMQVlQZz09>
. Kiel pasvorton enmetu la numeron de la naskiĝjaro de Esperanto (la jaro, en kiu aperis la *Unua Libro*). Vi trovas ĝin sur la paĝo <https://lernu.net/eo/esperanto>. Aŭ demandu ĝin per retpoŝto al hameln@esperanto.de.

Kosmos: Filozofio en Danlando

Jen speciala numero de Kosmos - pri la monda situacio kaj la venonta homregno. Bonvolu vidi la alkröĉitan dosieron.

Ole Therkelsen, Martinus-Instituto

Facile pri Nov-Zelando

Aperis artikolo en la retejo uea.facila.org, kiun prizorgas Anna Löwenstein kaj aliaj (<https://uea.facila.org/kunlaborantoj/>). La artikolon verkis Laurent Ramette kun la titolo 'En Nov-Zelando monto iĝas persono', kaj voĉlegis ĝin Mark Fettes:

<https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/en-novzelando-monto-i%C4%9Das-persono-r477/>

Pri la retejo <uea.facila> ni legas en ĝia bonveniga paĝo: 'La artikoloj estas mallongaj kaj facilaj por helpi homojn, kiuj nun lernas la lingvon, kaj ili enhavas nur la radikojn troveblajn en la listo de facilaj vortoj (<https://uea.facila.org/vortlisto/>).'

Sendis Ahmad Mamduhi, Prezidanto de ILEI.

Pola elsendo pri hirundoj



Jen ligo al nia 1397-a Eo-elsendo ĉe https://pola-retradio.org/.../05/e_elsendo-el-la-25-05-2025/. Ĝi baldaŭ estos aŭskultebla ankaŭ ĉe - <https://www.youtube.com/results?q=pola+retradio&sp=CAI%253D>;

- La vorton *hirundoj* la jokohama *Novaĵoj Tamtamas* el majo difinas kiel 'sezonvorton majan', ĉar tiu ĉi birdo en Japanio aŭguras someron. En Pollando hirundoj aŭguras printempon. Kaj kiel estas en aliaj landoj? Skribu al ni pri tio aŭ sonmesaĝu!
- Kulturkronikaj informoj rilatas al kunlabora iniciato inter la varsovia kaj la krakova Reĝaj Kasteloj; al esploroj konfirmantaj, ke la urbo Płock (pŭock) estas nekropolo de la Piast-dinastiaj regantoj; pri nova subtera itinero sub la krakova Wawel-altaĵo kun Draka Kavoj;
- Eo-komunumaj informoj rilatas al interparolo de Povilas Jegorovas, la prezidanto de LEA kun la Alta Protektanto de BET; kaj al la maja kongreso de kroataj esperantistoj;
- Enrigardu la majan numeron de la revuo *Esperanto* de antaŭ 90 jaroj kaj donu la atenton al la tiamaj klopodoj kaj laboroj rilate internaciigon de scienc-faka terminaro, al la uzo de Esperanto por fakaj laboroj;
- Muzike akompanas nin la armena kanto en Esperanto *Velo de Espero*, kiun kantas Meri Tiratsuyan; por la programinformo ni pruntis el la reto ilustraĵon el la sonvidea fabelo de Margonjo (Małgorzata Kosik) pri la Krakova Drako.

Ondo demonstrata kaj pri ĝia historio

Aperis en la reto la demonstra versio de la marta eldono de *La Ondo de Esperanto*. La 41-paĝa PDF-demoversio enhavas plurajn tekstojn kaj tekstofragmentojn el la riĉenhava 137-paĝa 323-a numero de *La Ondo*, publikigita antaŭ preskaŭ du monatoj. Legu pli aŭ elŝutu la dokumenton ĉe <https://sezonoj.ru/2025/05/ondo-143/> kaj pripensu vian (re)abonon.

Antaŭ 34 jaroj Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov kaj Viktor Kloĉkov venis al Nederlando kaj disdonis la unuan numeron de la renaskita revuo *La Ondo de Esperanto* al oficistoj kaj volontuloj de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo... Ekde tiam ni festas ne nur la naskiĝdatrevenon de Aleksander, la redaktoro de *La Ondo*, sed ankaŭ de la revuo mem. Legu pli ĉe <https://sezonoj.ru/2021/05/ondo/>.

===== vortoj: 1120 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikaĵoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komunikaĵo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunikaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikaĵoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

Dudek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024

ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill@>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikaĵojn pere de retlisto.